Boulogne Sur Mer, 31/5/2023

Karaj samideanoj:

Mi ĉiam konsideris, ke la agado de TEJO estas politika. Kiam oni ludas homlupon oni plifortigas ligojn inter homoj kun similaj celoj. Kundividante memeon oni vigligas kaj renovigas la esperantistan kulturon, fajro kiu vivigas la movadon. Eĉ korektante misuzadon de la akuzativo oni subtile, sed efike, instruas Esperanton, kaj tio ne nur signifas konfirmi la leĝon de Tonjo, sed ankaŭ trapasi la torĉon de la espero al novaj generacioj.

Kaj pro tio, komprenante la politikan dimension de nia junulara organizo, mi ne volas ripeti la tipan sintenon de multaj politikistoj kiuj alproksimiĝas al la fino de siaj oficperiodoj. En tiu revizia momento, taŭga por sinceraj analizoj, tiuj fiuloj troigas siajn atingojn, kaŝas siajn erarojn, serĉas pekportajn kaprojn por siaj neplenumataj promesoj kaj neglektas la kontribuojn de aliaj homoj. Do mi provos agi male, kundividante mian sperton kaj proponante ideojn por la estonteco.

La plej okulfrapa kritiko kiun mia periodo meritas estas la nekaŝebla fakto, ke mi ne sukcesis restarigi la argentinan junularan sekcion. Estas iom strange, ke la estrarano pri Landa kaj Faka Agado, kiu devas iel montri la vojon al landaj kaj fakaj sekcioj, estu nekapabla doni klaran ekzemplon per sia propra organizo, kiu parenteze estas inter la plej tradiciaj kaj solidaj en TEJO. Ŝajnas ŝerco, ke partoprenante en hazarda maja renkontiĝo 9 TEJO-aĝuloj en la sidejo de Bonaero ke tiu estrarano montru sin nekapabla gvidi ilin movaden.

Honeste mi ne donis al la loka agado la gravecon kiun ĝi ja bezonas, kaj ankaŭ iom pigras kaj malofte vizitas la bonaeran asocion por varti tiujn ĵuskreitaj verduloj. Malgraŭ ke mi ne perdas la esperon, ke iu miraklo okazu dum la ontaj monatoj, mi mense prokrastas la aferon kaj fokusiĝas pri renovigo de JEA dum la argentina kongreso de novembro. Ĝi nuntempe travivas klaran renovigon, kun pluraj scivolemuloj (kaj junaj kaj pliaĝaj) kiuj rapide iĝas movadanoj, kaj mi esperas helpi okazigi veran generacian transdonon de konoj inter tiuj novuloj kaj aktivaj membroj de pasintaj jaroj. Mi ja havas nenian meriton pri tiuj (multnombraj por Esperantujo) freŝbakitaj esperantistoj, plej juste ni danku al Infoprimates kaj al Pablo Molinari pro iliaj popularaj jutubaĵoj pri nia kara lingvo.

Alia memkritiko, eble plej videbla nur por stabanoj, estas mia klara manko de konoj pri la funkciado de TEJO kaj la movado. Estas nenia sekreto, ke post jardekoj kiel “satelita esperantisto”, mi kandidatiĝis por la estraro de TEJO kun apenaŭ kvar monatoj kiel komitatano. Mi ne kaŝos, ke mia tridekaĝeco ege influis en tiu iom hasta kandidatiĝo. Sendube ideale mi devis atendi tempeton da komitataneco antaŭ alveni al tiu decido, sed la nevenkebla Krono (kaj, nu, ni babilu franke, la manko de kandidatoj) puŝis min estraren.

Ankaŭ indas mencii, mian pavran agadon rilate al Junaj Amikoj. Ni okazigis je la komenco de la jaro kunsidon inter TEJO kaj UEA kie homoj montris sin ege kunlaboremaj. Malgraŭ tiu bona komenco mi ne sukcesis subteni tiun entuziasmon kaj la programo ne faris grandajn progresojn, kaj mi ja prenas mian respondecon pri tio. Espereble ĉijare TEJO sukcesos repreni tiun vojon kaj ni igu ĝin vojo por pligrandigi la movadon kaj ne “kreema librotenado” por pligrandigi la nombrojn de la movado.

Laste mi devas agnoski, ke mi ne bone organizis mian tempon. Kutime neglektis la Trello-tabelon kaj donis troan gravecon al longaj retpoŝtoj kiujn pluraj homoj konfesis al mi, ke ili rekte ne legis. Mi plurfoje sentis, ke ne nur mi ne trovis ekvilibron inter TEJO kaj miaj akademiaj, laboraj kaj personaj respondecoj, sed ke ankaŭ la tempon alĵuĝita al la movado ne estis aparte efika.

Tamen LFA, JA kaj aliaj komisionoj kun kiuj mi tanĝe rilatiĝis realigis plurajn atingojn. Kaj mi ege ŝuldas tion al tiuj homoj kiuj ĉirkaŭis kaj malavare, silente kunlaboris. Esperantistoj kun sincera pasio por disvastigi nian lingvon. Kiuj sincere alproksimiĝas al la movado por lasi sian "brikon". Kiuj tutkore emas semi esperon en la junularo.

Unue mi danku miajn kunestraranojn. Ne facilas kundividi teamon, kiel mi fanfaronas en Mastodonto, kun la plej babilema de la Komitato de TEJO. Tamen ili ĉiam estis paciencaj, diligente konsideris miajn proponojn kaj neniam petis al mi ke mi silentigu min. Mi ĉiam sentis plenan liberecon diri miajn opiniojn, kaj por homo kiu aparte ŝatas detale esprimi siajn ideojn tio valoras pli ol oro (aŭ, por ĝisdatigi tiun idiomaĵon, pli ol trijara administra subvencio!). Ĉiuj travideble kundividis siajn konojn kaj spertojn, kaj la rilato inter ni iĝis ne nur profesie glata sed ankaŭ franka kaj amikeca.

Due la komisionanojn de LFA. Ili daŭre proponis pripensitajn projektojn kaj samtempe igis la kunsidojn kaj la babilejon mojosa, amuza kaj memeplena. Mi aparte aprezas, ke ĉiuj strebis por kontribui kaj solvi problemojn kune. Ankaŭ menciindas la respondecon kun kiuj ili sciigis nin pri siaj personaj okupiĝoj dum epokoj en kiuj ili devis resti neaktivaj, per ekzemplo de ekvilibro pri kiu mi nepre devas lerni. Mi ankaŭ gratulu la energion kaj ideemon de la improvizitaj laborgrupanoj de JA, stabanoj de TEJO kaj UEA kiuj malavare akceptis, aldone al siaj multoblaj taskoj, helpi kadre de ĉi tiu forgesita fako.

Trie la referenculojn de landaj kaj fakaj sekcioj, ĉu aliĝintaj al TEJO aŭ ne. Ili daŭre montris konfidon kaj emon antaŭenigi idejn kaj, alvenante TEJO al siaj havenoj, ili ne hezitis surŝipiĝi. Tia malferma sinteno ne nur permesis antaŭenigi la projektojn de la komisiono, sed ankaŭ helpis min konstrui pli tutmondan perspektivon pri la movado. Mi egale dankas membrojn de landaj kaj fakaj asocioj, kiuj plurfoje montris nekredeblan, laŭdindan emon fondi aŭ restarigi siajn junularajn branĉojn.

Kvare mi volas helpi la membrojn de aliaj komisionoj de TEJO, komitatanojn, "izolitajn junulojn", patronojn, postenuloj de UEA kaj amikoj ĝenerale. Mi sentas, ke per daŭra dialogo ni malkovros, ke multaj esperantistj havas en siaj kapoj la similajn iniciatojn. Konstruante konfidon mi ne dubas, ke multaj projektoj kiuj povas ŝajni fantaziaj povas esti realigataj kunigante homojn kun la samaj celoj.

Laste mi speciale volas danki la volontulojn kaj laboristojn de TEJO. Nur stabano povas kompreni ilian sindediĉon. En la hispana kutimas la futbaleman idiomaĵo "ponerse la camiseta" ("vesti la T-ĉemizon") por tiuj homoj kiuj sentas kompromison por la organizo en kiu ili laboras, kaj en Argentino ni aldonas alian, "ponerse la 10" ("vesti la T-ĉemizon 10", kiel nia plej fama ludanto) por tiuj kiuj montras ne nur sindonon, sed ankaŭ elstaran agadon. Ili ĉiuj sentas veran amon por TEJO kaj, ĉiu en sia fako, kontribuas per la plej belaj goloj. Mi aparte dankas, ke ili plurfoje montris opiniojn malsimilaj al la miaj kaj eĉ kritikis min. Tio ne

nur helpis min iĝi pli bona estrarano kaj preni pli trafajn decidojn, sed ankaŭ iĝi pli bona persono.

Vidante estontecen mi volas paroli, iom ĝenerale, ne nur pri la fakoj kie mi taksas ke mi povus eventuale helpi kiel respondeca aŭ vicrespondeca estrarano, sed ankaŭ pri tiuj kiujn mi emfaze rekomendas al la tuta esperantista junularo emfaze prioritatigi dum la venontaj jaroj. Estas veraj ercoj malmulte esploritaj de TEJO, kaj vere povas longdaŭre ŝanĝi la organizon kaj Esperantujon mem dum la nuna jardeko.

Unue mi pensas ke TEJO, kiel preskaŭ jarcenta asocio, estas iom “departamentigita” organizo, kun komisionoj kiuj ne ĉiam glate rilatas inter si. Eble indas komenci labori pli horizontale, ĉirkaŭ konkretaj projektoj kiuj aperu iom pli spontanee laŭ la iniciato de la membraro mem kaj ne de la estraro. Por pluraj ideoj indas ankaŭ labori kun aliaj organizoj, ĉu esperantistaj ĉu junularaj. La nuna “laborgrupo pri Duolingo” estas klara pruvo pri tio. Kaj jen la rolo de la estraro de TEJO: ebligi kontaktadon kaj dialogon inter homoj kun similaj interesoj kiuj verŝajne ne konas unu la alian kaj oferi ilojn al entuziasmuloj kiuj memstare emas antaŭenigi ideojn.

Fako kiun mi taksas evidente antaŭenigebla estas financoj. La lastaj kasistoj faris grandan kaj sukcesan strebon por ordigi la librotenadon de TEJO ene de la granda ŝanĝo kiun signifis la sendependeco, kaj ilia laboro estas nepre laŭdinda. La rolo de la venontaj kasistoj (kun la helpo de aliaj estraranoj kaj aktivuloj) estos starigi fortan financan agadon kun la klara celo diversigi la rimedojn de TEJO: organizi kulturajn eventojn por rakolti fondojn por vojaĝigi evolulandajn junulojn, lanĉi donackampanjojn en sociaj retoj kaj instigi patroniĝon estas la unuaj ideojn kiujn venas al mia menso. Nepros ankaŭ havi proksiman rilaton kun kasistoj de landaj kaj fakaj sekcioj, favorante ties kapabligon, pensante ideojn por ke ili interkonatiĝu kaj, plej grave, ke ili sentu sin engaĝitaj en la tegmenta asocio kaj estu instigitaj iĝi kasistoj por ontaj okazoj.

Tio alportas min al alia vejno apenaŭ ekspluatata: talento. La ĉiperioda projekto pri mentoroj estis modela, kaj nepre estu daŭrigata (kaj pli bone disvastigata) estontece. Kiel oni konkludis en la lasta argentina kongreso, abundas talento en la movado. Simila ideo pri tiu por la kasistoj oni povas pensi por prezidantoj, sekretarioj aŭ komunikaj respondeculoj. Mi ne pensas nur en respondeca estrarano pri la fako, sed pri konstanta laboro de ĉiuj aktivuloj de TEJO, pensante kiel la organizo povas permesi al junuloj kiuj montras entuziasmon kaj energion sed ne scias kion konkrete fari disvolvi siajn kapablojn favore al Esperantujo.

Alia kampo nepre prioritatiginda estas adoleska agado. Miasperte plejpartego de esperantistoj ekkonas la lingvon dum tiu periodo. Abundas adoleskantoj en la sociaj retoj, sed ili ne estas ege disaj. Ĉi tie mi pensas, ke indas pensi ideojn kun aliaj organizoj (ekz. Verdaj Skoltoj kaj landaj sekcioj) por organizi unu aŭ du retajn renkontiĝojn por kunigi ilin. Iu diris al mi, ke adoleskanto kiu pasie agas en la movado estas klara signo de posta elstara agado. Do ni imagu kia estos TEJO dum la venontaj jaroj kaj UEA post jardekoj se ni pli forte okupiĝas pri ĉi tiu fako.

Kaj, kompreneble… junaj amikoj. Antaŭenigi tiun terra incognita de la movado nepras ne nur ekde komunika vidpunkto, sed ankaŭ jure kaj etike. TEJO nur iĝos tiu modela organizo kiun

ni revas se ni sukcesas elektigi tiun ĝis nun fantoman komitatanon C kaj havi konstantan dialogon kun tiuj homoj kiuj iam montris intereson pri la movado.

Mi konsideras, ke per la oficoj de kasisto kaj vicprezidanto (aŭ kiel senofica estrarano) mi povas eventuale helpi antaŭenigi tiujn fakojn. Tamen mi restas je plena dispono de la EK kaj la Komitato por eventuale preni aliajn rolojn.

Tutkore brakumas vin

Patricio